**La babiladaj rondoj** okazas vendrede je la 19a horo.
La gastiganto mem preparas simplan manĝaĵon (manĝon kaj deserton). La invitatoj alportas **nur** trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn. Je la fino ĉiuj donacas monon al la gastiganto por partopreni al liaj elspezoj. Okaze de kunveno ĉe Espace Dickens ĉiu kontribuas ankaŭ al la lupago de la salono. (Fr 80.-).

**"Ambaŭ grupoj"**: ... en Espace Dickens ve, la 21-an de aprilo invitos Monique k. Giulio ... kaj ve, la 19-an de majo, renkontiĝo organizota de Françoise Pétermann. **Aliĝu al unu aŭ la alia grupo ĉi-sube**

**"Okcidenta" :**

**ve, la 12-an de majo**
ĉe Gilbert Darbellay
ch. de l'Orme 6, Morrens
021 732 23 22 / 079 315 14 13

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd

**"Orienta" :**

**ve, la 5an de majo**
ĉe Marie-Antoinette k. Knud Sunier
av. des Alpes 150, Montreux
021 961 38 56

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6

**La bazara budo** okazas sur *la place de La Palud* en Laŭzano sabate inter la 9-a kaj la 12-a, **la 20-an de majo** kaj la **10-an de junio**. Aliĝu al: http://doodle.com/poll/6hgepagnb58it434


## Laŭzana Esperanto – Societo

ĉe F. Randin – ch. de Vallombreuse 14 * CH – 1004 LAUSANNE
+41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
www.facebook.com/societedesperanto.lausanne
Poŝtĉekkonto – CCP 10-26785-8
Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 – Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56


# Laŭzana Esperanto-Societo

# Informilo

majo 2017 – n° 05

**Lunde, la 1-an de majo je la 20-a**
ĉe Espace Dickens en Laŭzano

## Diskuto pri "falsaj amikoj" en Esperanto (paronimoj)

Multe da esperantaj vortoj proksimume similas – kiel en la franca - kaj oni facile konfuzas ilin. Oni vidos kelkajn el ili dum tiu renkontiĝo.

**Sabate, la 17-an de junio**
*Ekskurso al muzeoj en Fribourg*
*(vidu la pasintan informilon ; aliĝo fermota je la 15-a de majo)*

**Somera paŭzo**

**Lunde, la 4-an de septembro**
*Decidota*

**Proverbo**



Al ĉevalo donacita
oni buŝon ne esploras !

## Novaĵoj

Du eventoj en Martigny, kiuj interesas la esperantistojn :

La 13-an de majo :

**la unua Valeza Esperanto-Tago**,

organizota de Christian Darbellay, nevo de nia Gilbert. Vidu la ĉi kunan afiŝon kaj aliĝu !

La 23-an kaj 24-an de junio :

**la Festivalo de la 5 kontinentoj.**

Ĝi estas granda jara populara evento, dum kiu okazas muziko, bazaroj, manĝaĵoj el ĉiuj kontinentoj.

Vidu http://www.5continents.ch/home.html

Dum tiu festo ni instalos nian esperanto-budon por konigi kaj malkovrigi la internacian lingvon kaj nian agadon. Aliĝu ĉe François Randin por partopreni al ĝi.

**Jara ekskurso**

Ĉu vi ankoraŭ ne aliĝis ? Ne forgesu, la fino de la aliĝo kaj pago okazos la 15-an de majo. Vidu pasintan informilon.

## Amuza rakonto

### La muŝoj

Ĉirkaŭ tablo sidas: hispano, anglo, franco, germano, ruso, ĉino. Sur la tablo estas glasoj.

En la glasoj estas biero. Ili ĉiuj parolas - kompreneble - esperante !

Subite, tra la malfermita fenestro, flugas muŝo en la ĉambron... zzzz... La muŝo flugas en la ĉambro al la plafono al la muroj kaj subite falas en la glason de la... hispano.

Dua muŝo flugas tra la fenestro kaj falas en la glason de la anglo. Tria muŝo... zzzz.. falas en la glason de la franco. Kvara en la glason de la germano, kvina en la glason de la ruso, sesa en la glason de la ĉino.

La hispano leviĝas, surmetas sian ĉapelon kaj fiere eliras. La anglo prenas flegme sian glason, jetas la bieron teren kaj krias: "Kelnero, alian glason !". La franco estas tre malkontenta: li parolas, paroladas; li krias, kriadas; li bruas, bruadas; li estas tre kolera... sed restas ĉe la tablo. La germano trankvile, malrapide, prenas la muŝon el la glaso, jetas la muŝon sur la plankon kaj... trinkas la bieron.

La ruso rigardas la insekton, kiu naĝas en la glaso, kaj trinkas la bieron... kun la muŝo.

Sed la ĉino, kun ĝojega mieno, prenas la muŝon el la glaso... manĝas la muŝon... kaj trinkas la bieron...!

Je via sano !



*El Esperanta Legolibro, de Elio Migliorini*